GISTO, APR.2009
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
95760-000, Kaiurbo-RS, strato Esperanto, 880
Senpage disdonata dum la Verda Kafo.
Krom fore logxantaj rondanoj sxuldas R$ 1,00.

ILERA BULTENO (74)

Bele kaj zorge presita periodaĵo por la radioamatoroj far Lenio Marobin sekretario, kiu deĵoras en Londono, redaktis æi numeron kaj aperigas tre tre interesan studon pri la karakterizaj ecoj de pluraj R-frekvencoj (ondolongoj), inkluzive de la lasta teorio pri radioonda propagado tra la surtera spaco kaj tra la jonosfero dum kontaktoj kun satelitoj kaj, depende de ondolongo, transiras betonon kaj ferajn vandojn! Tial niaj poŝtelefonoj mirinde surprizas nin, uzataj en aŭto, en aviadilo kaj certe ankaŭ el ubots = submaraj ŝipoj ĝi sukcesas elsendi R-signalojn.

MAKAKOJ

Nun ankaŭ la gaŭcharo sentas sin minacata de serioza plago, nome la flava febro. Ĝi kontaĝas pere de moskito, la sama kiu disvastigas la dengon tamen ignorantuloj internlandaj kredas ke la makakoj infektas la homojn per bakterio kaj tial mortigas la nekulpajn makakojn kiu postrestas en la maldensaj kaj pokaj arbaroj.Ekologiaj organizaĵoj petas ke chiuj ni adresu e-mesaĝojn al niaŝtataj deputitoj kun peto, ke ili kaj kolegaro kontraŭstaru la ŝanĝon enhavatan en la projekto numero 4548/98, tre baldaŭ sbmetota al vochdonado en la Brazila Kongresejo. Jen almenaŭ du adresoj el inter multaj alvenintaj pere de e-mesaĝo: **assessoria@gabeira.com.br** – **dep.miroteixeira@camara.gov.br.**

Ni devas favori la kampanjon!

.....

CH-pravigo:>>Post modifo, en mia Unikode-sistemo, anstataŭ minuskla-C aperas jena figuro: ☻u ĝi pla☻as al vi? Solvenda afero. Ve al fuŝaj teknikistoj!

PIZANGOJ

Kiel komencanto mi provas lerni bonan teknikon por kreskigi fruktodonajn bananstaŭdojn. Ĝis nun mi sukcesis rikolti nur kelkajn malgrandajn achajn grapolojn. Por fari kion instruas popolaj publikaĵoj, nome, detrui la internaĵon de la pizangidoj kiuj naskiĝis apud granda staŭdo, mi kompatis tamen vizitis min parenco, lerta pri tiu afero. Li konfirmis ke oni devas senkompate detrui malkonvenajn ŝosojn, lasi altenkreski nur izolajn.Aldone 0ni disĵetu cindron, verdaĵojn kaj sterkon inter la plantojn, se oni volas rikolti belajn grapolojn. Nun mi deprenas la troajn idojn kaj transplantas ilin aliloken. Ŝajnas ke lante montriĝas alcelata rezulto. Do kiu el la legantoj havas bienon, ne multekostas provacele iri mian lernintan vojon. Poste rakontu al mi pri via sukceso.

DANĜERO

Jen avizo por homoj kiuj eble ne frekventas la e-retejon: Friponoj, laŭmode vestitaj alparolas junulojn antaŭ enirejo de kino, sin diras altgradaj personoj de forta entrepreno kaj petas intervjuon: Ili observas krome la trajtojn, vestaĵojn de la intervjuataj junuloj por arkitekti planon. Ili kalkulas pri tio: en la kinejo la junuloj ne rajtas uzi sian poŝtelefonon dum almenaŭ unu horo, tempo suficha por, per la detaloj sciataj, anonci en ties hejmoj falsan sekestron: “via fil(in)o”, (diras la ĝustan aspekton, aĝon, hararon,ktp) estas che mi. Tuj deponu kvin mil dolarojn!! “(diktas lokon, ie) - Karaj, estu singardaj!

“MI FORIRAS AL LA PRATEMPO”

Bonŝanculo homo kiu vizitadas la Internet-retejon kaj trovas la supran titolon, nacilingve:VOU-ME EMBORA PRO PASSADO. Ĝi konsistas el poemo lerte kunmetita de paraibano, per difino de aĵoj kiuj estigas saudadon en mezaĝaj homoj. Ekzemple:Glostora.Ĉu vi memoras ĝin, taŭga por dumventaj tagoj firme teni plejzorge frizitan hararon? Li citas preskaŭ senfinan nomaron de utilaĵoj kies nomojn vi rememoras nur hazarde, dum memorflagro. La markoj Astoria Odaliska, Phimatosan...Pastiljas Valda ... Piloloj Ross... memorigas kion? La teksto indas je arĥivado sur unu el tiuj PenDrive, por vasta distribuado kaj ĝuo de la aĝuloj char la nuna generacio ne komprenos la enhavon.

ENKETO

Ĉiuj en lernejo certe lernis sintakson, tio estas, la frazokunmeton, por verki nacilingvan tekston. Necesas teni enkapan vortaron kaj, chefe parkere bone sccii la prepoziciojn. Mia sensignifeco proponas iam (chu en GEA?) kune redakti unupaĝan tekston. Per tio mi celas forigi la brazilanismon en la pensado/skribado. Oni konstatas, ke la plimulto el ni ne sufiche evitas surpaperigi sian achan brazilanismon. Jen mia plilertiga propono al chiuj samideanoj.

KUNA TAGMANĜO

Domaĝe ĝis nun nur du kompanoj manifestiĝis ril. la tagon en majo. En POA, sabate aŭ dimanche, maleblas. Mi pensis inviti la geamikojn veturi al Kaiurbo sed konstateblas ke en mia vilaĝa urbeto, en la centro, sabate kaj dimanche la manĝejaj skipoj ankaŭ rifuzas labori. Solvo restus, se mi posedus aŭton. Tiaokaze ĝi okazus eksterurbe, che RS-122. Tial, kun granda bedaŭro, mi rezignas kunvoki la verdan geamikaron por la planita tagmanĝo.

AVANTAĜO de VORTKUNMETO

Teksto el “Aveno” jenas: “Ekzistas aliaj sanaj riskoj...” – Ĉu risko povas esti sana aŭ malsana? – Tial preferindas uzi kunmetitan vorton, nome, SANRISKO = Risko de la sano, ke eblas okazi malsaniĝo, laŭ mia kompreno.

El ZH:

VETURIGISTO

Kamionveturigisto haltis, eniris cheŝosean restoracion. Li mendis bifstekon kaj trinkaĵon. Tuj poste alvenis kvinopo da konataj motorciklistoj. Malrespekte unu el ili deprenis de la pleto portata de la kelnero la mangaĵon kaj ekmanĝis ĝin. Liaj kolegoj prenis kaj eltrinkis la refreŝigaĵon. Ĉe ridegoj ili festis per la konkeritaĵoj. La veturigisto timigite ne reagis, decidis peti la fakturon, pagis kaj eliris. La fiulachoj bruis feste kaj kontente komentis: tiu malkuraĝulo, ech ne reagis. La kelnero siaflanke nur observis la scenon, arigis la glasojn kaj nur supraĵe rimarkigis: krome, li estas tre mallerta ŝoforo. Ĵus, kiam li en la korto retrostiris, li detruis kvin motorciklojn!

GEEDZIĜO

Survoje al preĝejo la gefianchoj suferas kraŝon kaj mortas. Alvenintaj al la Ĉielo, la fianchino senkonsole plendas: domaĝo, Sankta Petro, ĝuste en mia edziniĝa tago mi devis suferi chi teruran akcidenton.La fiancho, praktika viro, riskas aldone sugesti: chu vi povus iel ripari la perdon, realigante nian geedziĝan ceremonion chi tie? Sankta Petro kompatas, promesis esplori, kion eblas aranĝi. Tri horojn poste li revenis kaj diris: mi alkondukis pastron sed estas grava kondicho. La edziĝo estos poreterne...ne ekzistas la alternativo de divorco.- Sed kial, scivolas la fianchino? – La chiela pordisto klarigas: se por trovi pastron mi devis serchi 3 horojn, bildigu al vi, en la Ĉielo trovi advokaton!